La revuo Esperanto
Oficiala organo de UEA

La informkampanjo ĉirkaŭ la UK 2009 daŭras

Multfoje en E-medioj ni cerbumas pri tio, kiel veki intereson de niaj lokaj amaskomunikiloj pri ni, esperantistoj, kaj pri nia agado. Aliflanke ni estas konvinkitaj, ke unu el la plej spektaklaj eventoj en nia komunumo estas la Universalaj Kongresoj.

La plej amasaj jaraj esperantistaj asembleoj kuniĝas por la UK-oj, dum kiuj sur la bazo de demokrata lingvoinstrumento – egala por ĉiuj – ni ne sole debatas kaj traktas seriozajn temojn. Ni ankaŭ amuziĝas kaj distras nin per varia kultura programo, inkluzive de diversstila muziko, spektakloj, ne laste ni amikiĝas kun homoj el mondopartoj tre foraj por ni.

Jen taŭga okazo por rakonti en nia eksteresperantista medio pri travivaĵoj kaj spertoj lige kun la Universala Kongreso, kiun ni partoprenas.

Tial UEA relanĉis ĉi-jare la Gazetaran Informkampanjon ĉirkaŭ la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. Jam komence de junio, dank' al la modela Gazetara Komuniko, kelkaj el la kongresontoj kontaktis siaregionajn ĵurnalistojn, kaj okazis la unuaj amaskomunikilaj rendevuoj okazis.

Nun tiun ŝancon havas ĉiuj kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la kampanjo, sed ĝuste partoprenas la UK-on.

Ne hezitu telefoni postkongrese al via loka ĵurnalo, radiostacio aŭ televidkanalo. Rakontu pri via sperto el reala renkontiĝo, pruvanta la vivantecon de la interkultura dialogo pere de Esperanto. Dividu viajn impresojn pri la eksterordinara renkontiĝo, dum kiu kun la sento de plena, reciproka lingva komforto vi povis alparoli ĉiun el ĉ. 1800 personoj el 60 landoj de la mondo. Ne forgesu montri viajn fotojn.

Ni certas, ke via rakonto vekos intereson kaj oni volonte intervjuos vin pri la UK kaj pri Esperanto.

Povas esti, ke tiuokaze ligita kontakto kun loka ĵurnalisto fruktos ankaŭ estonte per pliaj kontaktoj, kiam via klubo, grupo aŭ rondo aranĝos interesan prelegon, ekspozicion, gastigos eksterlandan esperantistan gaston.

Lige kun la ĉi-jara kampanjo funkcias aparta paĝo: *www.gazetaro.co.nr/*.

Vizitu ĝin kaj informu nin pri viaj kontaktoj kaj sekvaj artikoloj, intervjuoj k.s.:

Barbara Pietrzak
estrarano de UEA
pri informado

Emilio Cid
respondeculo pri la
informa gazetara
UK-kampanjo 2009